do, Teo Jung *esploras* (sed nur unuflanke), kaj *enmiksas* sin en la konflikton en Ameriko, kiu certe estas ĉiurilate malpli proksima al li ol la konflikto en UEA?

Unu plua punkto bezonas klarigon. Tiu rilatas al la difino de la vorto *ATAKO*. "Plena Vortaro" difinas la vorton *ataki*: "komenci batalon kontraŭ malamiko"; kaj nia angla vortaro: "komenci malamikecojn kontraŭ". Niaj legantoj notu bone, ke Teo Jung *komencis* la malamikecojn en *Heroldo* 16.9.52 – do *JUNG ATAKO* – en artikolo titolita "Por reorganizo de la usona Esperanto-movado", kune kun maljustaj epitetoj kontraŭ ni kiel ni listigis supre. Tiu artikolo estis por rekte helpi al la marksistaj skismo-intrigantoj. Ni, *persone*, respondis al tiu atako *unufoje nur*, septembro '52, do, *Connor Respondo al Jung Atako*. Kaj, ja sufiĉe forte ni respondis, sed ni pretas pravi ĉiujn asertojn en tiu respondo per dokumentoj kaj pluaj faktoj, se tio necesos. Sed regas stranga kanibala moralo en nia movado. Se iu "grandegulo" atakas simplan laboranton por Esperanto – tio estas justa; sed se tiu kompatindulo volas defendi sin – tio estas ofenda al majesteco. Se internacia organizo detruas landan asocion – tio estas ankaŭ justa; sed se landa asocio protestas kontraŭ tio kaj pri la maljustaĵo sciigas publikan opinion – tio estas detruo de Esperanto. Se komunistoj misuzas Esperanton (ne la lingvon sed la movadon) por siaj celoj – tion oni aplaŭdas kiel "granda progreso al Nova Epoko"; sed se kontraŭ-komunisto volas montri la danĝeron de tio – oni malpermesas al li tion en la nomo de "neŭtraleco". Unu leĝo de la naturo (sed ne sub komunistaj regado) estas, ke oni rajtas defendi sin. Ni ja respondis al la *JUNG ATAKO* kaj tuta serio de liaj malamikecoj antaŭ tri jaroj. Ni nun respondas al denova *JUNG ATAKO* nuntempe – kaj estonte ni defendos nin laŭnecese.

Konklude, ni sincere diras, ke ni vere ŝatus kunlabori kun Teo Jung (se li povus toleri kontraŭ-komuniston). Ni havas nenian personan malamon kontraŭ li. Sed ni ne ŝatas la subsugeston, ke kontraŭ-komunisto ne estas "samideano de bona volo", (vortoj kiujn li rekte prenis el la bulteno de ELNA kaj verkita de iama prezidanto de komunistaj institucioj). Je nia flanko, ni penas pritrakti Heroldon tutsame kiel aliajn Esperanto-instituciojn. Ni regule akceptas abonojn. Ni mendas librojn. Kaj, se Jung nur ĉesus ataki nin, kaj ĉesus helpi al ELNA detruo la landan asocion EANA, – alivorte ĉesus *enmiksi* sin en la konflikton en Usono, – ni povus pli bone servi lin kaj la Esperanto-movadon en pli da "harmonio". Inter li kaj ni, "estu espero pri la estonteco", ju pli frue des pli bone. Sincere ni tion esperas, kaj ni titolas nian artikolon laŭ nia lasta parafrazo: "Antaŭen kun Teo Jung en harmonio kaj kun fido!" Guste tiel!

– La Redaktoro

EANA IS PERANTO FOR UEA IN USA: Because of a misleading circular, sent out to our members by the so-called "Chief Delegate of UEA", we receive requests for clarification. The "Chief Delegate" mentioned has no connection with EANA, and there has been no change whatever in the status of EANA as PERANTO for UEA. Memberships and delegates are accepted by EANA.

NOMINATIONS COMMITTEE OF EANA: President, Vice President and Gen'l Sec'y are to be elected this year. Present incumbents: Prof. J. M. Brewer, Mrs. S. S. Marks, G. A. Connor respectively. Send all suggestions for candidates by April 1st to: Mary Marrett, Chairman, 40-43 Gleane St., Elmhurst, N. Y.

The Esperanto Association of North America

REZULTO DE LA KONKURSO PRI VARBADO DE NOVAJ MEMBROJ

EN la kampanjo "Ĉiu Membro Varbu Unu Novan Membron", en Decembro la jenaj niaj membroj havis sukceson: *H. Kruse* (2), *S-ino Rubey Kelber* (2), kaj *D. Walton*, *H. Soudée*, *J. P. Maddex, Jr.*, *G. Di Giovanni*, *P. Pibichyn*, *Connie Davis*, *J. Schackmann*, *D-ro F. Ballard*, *A. Nixon*, *E. E. Narcus*, *R. J. Throckmorton*, ĉiuj po unu nova membro.

Kiel ni anoncis, en Decembro finiĝis la konkurso pri varbado de novaj membroj por EANA. En la fina rezulto, dum la jaro 1955 la jenaj kvin niaj membroj varbis plej multe kaj gajnis la premiojn: *Henry Soudée* (24), *J. Henry Kruse, Jr.* (12), *Richard T. Vineski* (9), *S-ino Lillian Fuller* (5), *F. Karl Immeke* (5). La du unuaj gajnintoj ricevis po ekzempleron de la nova libro "Ilustrita Vortaro de Esperanto", kiujn donacis ĉef-kunlaboranto de tiu verko, *S-ro Donald R. Broadribb*. Certe s-ro Broadribb multe kontribuis al nia kampanjo pere de donaco de tiuj vere belaj kaj valoraj libroj. La tri aliajn libropremiojn donacis EANA.

Ni gratulas al la gajnintoj kaj dankas al ĉiuj partoprenintoj, kiel ankaŭ al ĉiuj nekonataj propagandistoj, kiuj ĉiuj kune dum la jaro 1955 gajnis 210 novajn membrojn por EANA. Fininte sukcese la konkurson en 1955, ni malfermas nun la novan por la jaro 1956. Ni invitas kiel eble plej multajn membrojn partopreni en ĝi. Denove estos kvin premioj, kiuj konsistas el valoraj Esperantaj libroj. La titolojn de la libroj ni anoncos en la sekvonta n-ro de AE.

La kampanjon por 1956 jam komencis *S-ro Andrew Rogus*, kiu varbis du novajn membrojn, kaj *S-ro Henry Kruse*, kiu varbis unu. Ni denove volas akcenti, ke plej bona ĝis nun elprovita metodo de varbado de novaj membroj estas "Leteroj al Redaktoro". EANA organizis specialan Komitaton por la kampanjo "Leteroj al Redaktoro", kies estro estas *S-ro Richard T. Vineski*. Dank' al s-ro Vineski kaj liaj 21 kunlaborantoj la gazetaro en Usono estas konstante "atakata" per leteroj pri Esperanto. Multaj de tiuj leteroj iras al paper-korbo, sed oni "semas kaj semas konstante". Sed se iu letero kun adreso de EANA sukcesos esti presita en gazeto ĝi rezultigas multajn informpetojn kaj poste aliĝojn al EANA.

Se iu deziras partopreni en la kampanjo "Leteroj al Redaktoro", li estas petata skribi al: *Richard T. Vineski, 1808 14th Ave. So., Minneapolis 4, Minn.* De li oni ricevos ĉiujn instrukciojn, modelojn de leteroj kaj adresojn de gazetoj al kiuj sendi la leterojn.

Artikoloj kaj Leteroj al la Redaktoro pri Esperanto aperis lastatempe en la jenaj ĵurnaloj pro iniciato de koncernaj membroj de EANA: "New York Herald Tribune" (*Abe Fadem*); "The Hamilton Spectator" (*Harold Mason*); "Salt Lake Telegram" (*D-ro S. B. Talmage*); "Relator", Cali, Kolumbio, (*William P. Vathis*); "Hawaii Catholic Herald" (*C. C. Cumming-smith*); "Ameryka Echo" (*Myron R. Mychajliw & Andrew I. Rogus*); "Boston Globe" (*S-ino Rubey Kelber*); kaj en la jara kalendaro de la pola gazeto "Nowy Świat" aperis reklamo pri Esperanto kaj EANA pagita de *Andrew I. Rogus*.

ESPERANTA KRONIKO

Lima Esperanto-Asocio havis sian jarkunvenon dum kiu ĝi elektis la estraron: Prezidanto, *ĉ-rino Luella K. Beecher*; Vic-Prezidanto, *S-ino Mable Jay*; Sekretario-Kasisto, *S-ino Arthur M. Vaughn*. Fiel kutime la tuta grupo de 9 personoj renovigis sian membrecon en EANA. Sed kun bedaŭro oni raportas ankaŭ pri la morto de unu membro, *S-ino Earl Sealts*. Al la edzo, *S-ro Sealts*, kiu ankaŭ estas membro de la Asocio, ni esprimas kondolencon.

Esperanto-Societo de Montreal, Kebeko, komencis bone sian sezonan aktivecon per kunveno de 85 studentoj en la loka YMCA. Komenciĝis nova kurso kaj oni anticipas sukceson.

Nia samideano S-ro Y. Gulsoy nun estas en Chicago por fini siajn studojn ĉe la Universitato Chicago kaj doktoriĝi. S-ro Gulsoy estas el Turkujo kaj dum kelkaj jaroj loĝis en Kanado, kie li studis en Universitatoj de Vancouver kaj Toronto.

S-ro Osvaldo Marrero el Kubo jam antaŭ iom da tempo venis al Usono. Li studas en kolegio en la ŝtato Montano. Dum libertempo s-ro Marrero vojaĝas kaj vizitas naciajn parkojn en la Okcidento. Pri siaj impresoj li skribis al ni jene: "...Ĉio superas tion, kion mi anticipis; la unua impresio estis montara pejzaĝo de la parko Yellowstone. La Granda Kanjono de la Rivero Yellowstone estas plej rava vidindaĵo. La dua mirindaĵo por mi estis akvofaloj. Kaj tiuj 300-futaj kaj tiuj pli malgrandaj estas egale belaj kaj pitoreskaj. Kaj la tria kaj plej granda mirindaĵo por mi estis gejoj, unu el la plej belaj naturaj fenomenoj kiujn mi iam vidis."

En Honolulu, Havajaj Insuloj oni vikle kaj sukcese laboras por Esperanto. Dank' al klopodoj de niaj samideanoj *Frato Charles C. Cummings, S.M.*, bibliotekisto de St. Louis College, kaj *S-ro Bunni J. Chambers*, radioteknikisto ĉe Civila Aeronautika Instanco, okazis en la ĉefhalo de urba biblioteko dum la Zamenhofa monato (decembro) tutmonata Esperanto-ekspozicio. Pro la konvena loko kaj psikologie trafa aranĝo de ekspozicio ĝi altiris atenton de ĉiuj vizitantoj al la biblioteko. Favoraj recenzoj pri la ekspozicio mem kaj komentoj pri Esperanto aperis en lokaj matenaj kaj vesperaj ĵurnaloj. S-ino Kathleen Kerr, ĉefo de la Fako por Publikaj Rilatoj de la biblioteko faris radio-paroladon. Dank' al tiu ekspozicio, kiel ankaŭ pro la vizito al la Insuloj de ges-roj Loozits, Estonaj rifuĝintoj-Esperantistoj, la publiko en Havajo estas familiara kun

Esperanto. Pro la speciala karaktero de la Insuloj oni ne povas anticipi "grandan sukceson" tamen konkretaj atingitaĵoj jam estas videblaj. Labildo montras parton de la ekspozicio Ĝi povas doni inspiron por aliaj.

Foto de Fr. H. J. Fien



En la antaŭa AE ni raportis pri ses novaj kursoj de Esperanto en diversaj lernejoj de la ŝtato New Jersey; kie dank' al senlaca kaj oferema laboro de ĝeinstruistoj, la kursoj plene sukcesis. Parto de la lernantoj aliĝis al la loka Esperanto-Societo por praktike aplikadi sian lingvo-



scion dum la kunvenoj kaj por pliperfektigi en la kurso por progresantoj. La Societo havas siajn regulajn kunvenojn en YMCA de South Orange. La Prezidanto de la Societo, *S-ro Donald F. Walton* zorgas pri la vigleco de la kunvenoj, seriozeco de la programo, kaj plánado de la aktiveco. Ĝuste nun pasas kvin jaroj, kiam *s-ro Walton* unue interesiĝis pri Esperanto kaj aliĝis al EANA. Dum sia kvin-jara Esperantista vivo, li ne nur mem ellernis Esperanton kune kun siaj unuaj kunlaborantoj, kiuj nun estas kursgvidantoj, sed tra liaj kursoj trairis dekoj da studentoj, kiuj kvankam nun ne aktiviĝas en nia movado, tamen havas sufiĉe da inspiro por reveni al nia rondo ĉe oportuna tempo. Li vendis pli ol 300 lernolibrojn kaj vortarajn, disdonis milojn da propagandiloj, kaj pro siaj personaj kontaktoj kun multaj gravaj personoj en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo li sukcesis meti ideon de Esperanto por konsidero de lernejoj kaj edukaj instancoj. La tuta grupo jam dum jaroj laboras pri sia grandioza plano enkonduki Esperanton en la lernejojn de la ŝtato, kaj estas antaŭsignoj ke tiu revo estas efektivebla. Menciinda estu ankaŭ fakto, ke la grupo havas en sia kaso kelkcent dolarojn. La foto supre estas hazarda, kaptita post unu kunveno. *S-ro Walton* estas sidanta en la mezo.

Esperanto-Societo de New York komencis sian ĉi-jaran aktivecon en Novembro per ĝenerala kunveno, dum kiu oni elektis *S-ron Andreo Rogus* kiel Prezidanton, kaj *F-inon J. Louise Owens* kiel Kasiston. La kunvenoj okazas ĉiun unuan kaj trian sabaton de monato en YMCA ĉe 23-a Strato. Vere estas du kunvenoj sinsekve; unue estas unuhora kurso por progresantoj, kaj post tio membra kunveno kun programo. La kunvenoj estas kondukataj nur en Esperanto. Dum la kunvenoj en Decembro la ĉefparoladoj estis tiu de *S-ro Myron Mychajliw* pri Kristnaskaj kutimoj en Ukrainujo, ilustrita per gramfondiskoj kun Ukrainaj Kristnask-kantoj; kaj tiu de *D-ro S. B. Kaban* pri analizo de deveno de Esperanto sur la fono de la personeco de Zamenhof.

Vizitis la Centran Oficejon lastatempe du junaj samideanoj el Japanujo, *S-roj K. Yoshino* kaj *S. Nakamura*. Ambaŭ estas junaj inĝenieroj sur Japana ŝarĝboato. Alia vizitanto estis usona ŝipano, *S-ro Henry B. Milsted*. Li ĵus ricevis ateston, kiu rajtigas lin esti ŝipestro. Unu tagon li esperas estri propran ŝipon, kiu surhavas verdan stelon. Vizitanto el Aŭstralio estis *S-ro Milo Zvara*, kiu rifuĝis el Ĉeĥoslovakujo en 1949, kaj vivis en Sidney, kie li aktive partoprenis en la loka klubagado.

LA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO

D-ro William Solzbacher

Membro de la Akademio de Esperanto

Francisko Azorin, Ilustrita Vortaro de Esperanto, kun bazo seslingva kaj etimologia de ĉiu radikvorto; 50 000 vortoj, grandparte ilustritaj; kontrolita de kompetentaj, diversfakaj kunlaborantoj diversnaciaj: portugala, Elisa Caetano; itala, Mirza Marchesi; franca, Charles Chomette; germana, J. F. Berger; rusa, A. F. Postnikov; usona, D. R. Broadribb, k. a. Editorial Stylo, Mexico, 1955. Unua Volumo: A-K, XVI – 644 paĝoj, bind. \$7.00, broŝ. \$6.50. Havebla de EANA-Libro-Servo.

LA Ilustrita Vortaro de Esperanto, kiun S-ro Azorin preparis dum multaj jaroj, unue en la formo de nova eldono de la Plena Vortaro de SAT, poste en sendependa laboro, estas granda kaj ambicia verko. La aŭtoro volis prezenti vortaron, kiu estu pli kompleta kaj pli utila ol ĉiuj aliaj Esp-vortaroj. Kompare al ili, la libro de Azorin havas jenajn kvalitojn:

1. Ĝi estas pli ampleksa: Volumo I havas 660 grandformatajn paĝojn.
2. Ĝi estas ilustrita per pli ol 600 bildoj. Kelkaj el ili estas pure ornamaj, aliaj estas utilaj por pli bona kompreno de la vortoj. Ankaŭ en estas tabeloj pri gramatiko (Sĥnoptika Gramatiko de Esperanto kaj Plena Gramatiko laŭ Zamenhof), aritmetiko (ideografio), arkitekturo (kolonoj de diversa stiloj), geologio, kemio (Kemias Elementoj laŭ alfabeto ordo kaj Atoma Skalo), koloroj, zoologio, kaj tiel plu.
3. Ĝi atentigas pri la etimologio de la vortoj kaj donas liston de tradukoj aŭ etimologie similaj vortoj en aliaj lingvoj: angla, franca, hispana, portugala, itala, germana, dana, sveda, rusa, latina, greka.
4. Ĝi enhavas ne nur radikojn, sed ankaŭ kunmetitajn vortojn. En la Antaŭparolo la aŭtoro diras: "Ni metas en nian Vortaron, post la oficialaj radikoj (4444), 1056 novajn, 2000 jam videblajn en la Plena Vortaro kaj plie 50 000 kunmetojn, entute ĉirkaŭ 60 000 vortojn; ĉiu kun ĝia difino, simile al vortaroj nacilingvaj." (En la titolpaĝo la libro tamen diras, ke ĝi enhavas 50 000 vortojn.)

5. La libro enhavas multajn ekzemplojn kaj modelajn frazojn, grandparte el la verkoj de D-ro Zamenhof, ĉefe el la Malnova Testamento.

La kompilado de tia verko estas grandega tasko. Ju pli granda ĝi estas, des pli multnombraj estas la okazoj por fari erarojn. Fakte tia verko, por vere sukcesi, bezonas la kunlaboron de multaj fakuloj, centran labor-ejon en urbo, kie tiaj fakuloj kaj ĉiuspecaj informfontoj abundas, pres-ejon kun spertaj kompostistoj. Tia vortaro, se ĝi vere plenumus sian taskon, estus unu el la plej gravaj akiraĵoj de Esperanto.

Mi dubas, ĉu S-ro Azorin kaj liaj helpantoj plene komprenis la komplikecon de la tasko, sed mi tute ne dubas, ke la rezulto estas tre malproksima de la celo de la verko. Multaj eraroj kaj neperfektaĵoj eble estis neeviteblaj en la unua eldono kaj povus esti korektataj en reviziita eldono. Sed kelkaj kritikindaĵoj estas pli seriozaj. Oni povus nomi ilin denaskaj malsanoj de la Ilustrita Vortaro. Por korekti ilin, ordinara revizio ne sufiĉus, sed ŝanĝo en la bazaj labormetodoj kaj treege temporaba kaj severe kritika transformado de la teksto estus necesaj.

Antaŭ nelonge S-ro Azorin skribis al mi: "La libro, kiel vi vidis, ne

estas perfekta. Ĉu homa verko povas esti tia? Vi tamen estas iomete respondeca: Rememoru, ke vi ne volis – ne povis – kunlabori en ĝi, kiam mi vin invitis...” Estas vere, ke S-ro Azorin antaŭ multaj jaroj, kiam li ankoraŭ ne estis trovinta la kunlaborantojn, kies nomoj aperas sur la titolpaĝo de la libro, afable invitis min al kunlaborokaj sendis al mi kelkajn kajorojn de la manuskripto. Trarigardante ilin, mi vidis, kiel grand-skala la plano estis, kiom da valora materialo S-ro Azorin jam estis kolektinta, sed ankaŭ, kiom da eraroj, fuŝaj klarigoj kaj dubaj principoj difektis la verkon. Post longa pripensado mi vidis, ke mi tute ne havos la tempon necesan por kritika kribrado kaj sistema revizio. Eĉ se mi estus havinta pli multe da libera tempo, mi ne estus povinta fini la laboron ĝis nun. Se mi estus vidinta la manuskripton antaŭ la presado, mi estus doninta al S-ro Azorin almenaŭ unu konsilon: ke li prokrastu la publikigon por kelkaj jaroj kaj klopodu havigi al si novajn kunlaborantojn.

Eble kelkaj legantoj de Amerika Esperantisto, sekvinte mian recenzon ĝis ĉi tie, demandos: “Ĉu la libro do estas neniel rekomendinda? Ĉu ni ne devus aĉeti ĝin?” Al tio mi respondas, ke la verko enhavas multe da valora kaj pensiga materialo kaj ke ĝi estas utila al spertaj kaj kritikaj uzantoj. Multaj Esperantistoj ankaŭ deziras posedi ĝin pro tio, ke ĝi estas la plej granda Esperanto-vortaro eldonita ĝis nun, la sola Esperanto-libro grandampleksa publikigita en Meksiko, kaj verko eble utile montrebla propagandcele. Mi mem metis la Ilustritan Vortaron en facile atingeblan lokon por uzi ĝin ofte. Al nespertaj kaj nekritikaj personoj mi tamen ne povas rekomendi ĝian regulan uzon. La Plena Vortaro, kvankam ĝi enhavas erarojn kaj kritikindaĵojn, estas solida kaj ĝenerale fidinda. La Ilustrita Vortaro, tia kia ĝi estas nun, tute ne povas anstataŭi ĝin. Laŭ amplekso, la sola Esperanto-vortaro komparebla al la libro de Azorin estas la *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana* de Eugen Wüster. Bedaŭrinde nur iomete pli ol duono de tiu verko (4 partoj el 7) estas publikigita, kaj ĝi estas plene utiligebla nur de personoj sciantaj la germanan lingvon. Ĝi estas multe pli altkvalita ol la Ilustrita Vortaro, ĉar la kunmetitaj vortoj, kiujn ĝi enhavas, estas zorge kolektitaj el la Esperantoliteraturo, dum la verko de Azorin enhavas multegajn vortojn, kiujn neniu uzis ĝis nun, sed kiuj venas nur el la fantazio de S-ro Azorin – bedaŭrinde fonto de duba aŭtoritato.

S-ro Azorin enmetis en la Ilustritan Vortaron multe da informoj enciklopediaj. Tio kompreneble faras la libron pli interesa kaj utila. Sed tio ankaŭ povas esti danĝera kaptilo, se la informoj ne estas kontrolataj de fakuloj, sed prezentataj en amatora maniero. Ekzemple, sub diversaj literoj de la alfabeto, la libro montras grafike la devenon de la latinaj literoj, prezentante parencajn formojn el la egipta hieroglifa skribo kaj el la fenika, hebrea, greka kaj aliaj alfabetoj. Bedaŭrinde la Ilustrita Vortaro enhavas erarojn en tiuj ilustraĵoj. Ekzemple la araba litero montrita sub *b* fakte estas *j*, la araba litero montrita sub *f* fakte estas *n*.

La kemiaj elementoj estas prezentataj en du tabeloj, sur paĝo 107 laŭ la atoma numero, sur paĝo 543 en alfabeto ordo. Tio estas utila. Sed, donante la internaciajn simbolojn de la elementoj, S-ro Azorin “plibonigis” ilin, skribante *Vv* por *W* (Volframo), *Ks* por *X* (Ksenio), *It* por *Y* (Itrio), *Ib* por *Yb* (Iterbio), *Tu* por *Tm* (Tulio). Ke la dua tabelo havas *Mg* por Magnezio kaj por Mangano (kiu devus esti *Mn*), eble estas nur preseraro.

Ŝajnas do, ke la aŭtoro de la Ilustrita Vortaro opinias, ke proponante al sciencistoj la uzon de Esperanto, ni devus unue postuli, ke ili ŝanĝu internacian sistemon de simboloj, kiujn ili jam posedas kaj kiuj estas universale kaj senescepte uzataj.

Lasante detalojn, mi nun deziras diri ion pri la baza malsano de la Ilustrita Vortaro: S-ro Azorin kaj liaj amatoraj gekunlaborantoj ĉerpis tro multe da "informoj" el sia fantazio kaj el la aplikado de malbone komprenataj reguloj de "logiko" kaj "analogio", sed ne sufiĉe atentis la faktojn de la lingvo tia, kia ĝi estas kaj aperas en la verkoj de bonaj aŭtoroj kaj en ĉiutaga praktika uzo. La aŭtoro de la Ilustrita Vortaro nebone komprenas kelkajn gravajn detalojn en la gramatiko, vortkunmeto kaj stilo de Esperanto. Liaj gramatikaj, etimologiaj, leksikologiaj kaj stilaj eraroj montras, ke li ne sufiĉe majstras la uzon de la akuzativo, de la infinitivo, de la participo, de la adverbo, de la refleksiva pronomo, de kelkaj vortoj en la tabelo de korelativoj, de la sufiksoj *-iĝ-* kaj *-ebl-*, kaj de la fundamentaj principoj de vortkunmeto.

Jen kelkaj ekzemploj—elcentoj: "ADAM-o ... homo, kreita de la Eternulo el argilo, *enblovante en ĝi spiron de vivo*" (10) — "ESPER-ANTIĜI...*iĝi, fariĝi Esperanto io alilingva. Ekz. Ĉu iam tute esperantiĝon Donkiboto?*" (306) — "*Iom pli mi devos vin aldiri*" (35) — "Ne estas lojala, perfide komenti ies konduton" (567) — "DIREKT-o...*alcela linio montrante ne nur la direkton, sed ankaŭ la adreson*" (239). — "Ĉe vi ne kombiĝis ankoraŭ?" (566) — "Briko de sapo" (160) — "Kolero disŝprucis liaj okuloj" (242) — "Post seriozaj studoj *fakultiĝis al li por praktiki tiun profesion*" (321) — "FAKULT-ATO...*universitata fako leĝe fakultata por instrui kaj doni titolojn, fakultante agi profesio profesiulojn*" (321) — "Ni ĉiuj estas *faleblaj*" (321) — "*animi la enuan atmosfero de la kunveno*" (68), kaj tiel plu.

En kelkaj lokoj la fantazio de S-ro Azorin senkompatate forgalopas kun li, ekzemple kiam li elpensas 106 (jes, cent ses) vortkunmetojn kun *ĉies*. Li malatentas la fakton, ke la *-ies-*vortoj havas nur posesivan karakteron kaj ke *ĉies* tute ne povas esti ĝenerale uzata anstataŭ *de ĉiuj*. Jen kelkaj el la "modelaj frazoj", per kiuj S-ro Azorin nin regalas: "*Ciesiĝi virino ne estas bona kombino*" — "Knabino *ĉiesdezirata* nenies amata" — "Per fingro li estos *ĉiesmontrata*" — "*ĉieslaŭdinda* agado" — "*ĉieslaŭdota* gesto" — "*ĉieskonataĵo* pro malbonaĵo" — "*Ĉiesmokanto* zorgu ne fariĝi *ĉiesmokato*". La tuta paĝo 191 aspektas kiel malbona ŝerco.

Pri la uzo de ekzemploj kaj modelaj frazoj S-ro Azorin havis la tre laŭdindan ideon, ĉerpi multajn el la verkoj de D-ro Zamenhof, ĉefe el la Malnova Testamento, ĉar Zamenhof multe laboris pri tiu traduko en la lasta parto de sia vivo kaj zorge reviziis ĝin. La Ilustrita Vortaro enhavas abundan trezoron da modelaj frazoj el la Malnova Testamento. Ilia elekto sendube kostis multe da tempo kaj laboro. Pro tio S-ro Azorin meritas la dankon de la uzantoj. Eĉ pli grandan dankon li meritas, se li estus zorginta pri la forigo de preseraroj, kiuj fakte atribuas gramatikajn erarojn al Zamenhof, ekzemple: *Ili estis komenconta* la servadon (567) — "Ĝia komercenspeco kaj *ĝiaj promalĉastaj donacojn* estos konsekritaj al la Eternulo" (567) — "Jen estas *la brutoj kiujn, vi povas manĝis...*" (75) — "Libereco elkovas *grandajn entreprenojn*" (281). Estas multaj tiaj eraroj en la libro.

La plimulto de la modelaj frazoj ne prenitaj el la verkoj de D-ro Zamenhof ŝajnas esti fabrikitaj de S-ro Azorin kaj liaj gekunlaborantoj. Multaj el la ekzemploj, kiuj prezentas simplajn frazojn, estas bonaj, sed superflujaj. Multaj el tiuj, kiuj ilustras malsimplajn problemojn (helpo pri malfacilaj problemoj ja estas unu el la ĉefaj taskoj de vortaro, ĉu ne?) estas fuŝaj kaj pezstilaj. Jen kelkaj "juveloj": "Oni akvokondukas grandan kvanton da akvo al la urbo" (34) – "La neĝo akvoliveras kvanton da akvo al la rivero" (34) – "La ĉastistino havis malĉastistinon kiel frat-inon" (196) – "Alestu al ŝi pli intime" (36) – "La knabino ne anticipigu kun li" (74) – "bestaĵoj kaŭzataj de sinnekonado" (139).

El la difinoj kelkaj estas prenitaj el la Plena Vortaro, sed la plimulto estas originala. Multaj el ili estas gramatike nekorektaj, verkitaĵ en fuŝa stilo, aŭ sensecaj. Simplaj substantivoj formitaj el verбай radikoj estas difinitaj jene: *ĉaso - ago kaj rezulto ĉasi; aspekto - ago kaj rezulto aspekti; edziniĝo - ago kaj rezulto edziniĝi*. La *iĝ*-vortoj ricevas jenan pritraktadon: *avertiĝi - iĝi averti, iĝi avertata; kombiĝi - iĝi kombi; diriĝi - iĝi diri*.

Kelkfoje la ekzemploj kontraŭdiras la difinon. Ekzemple sub *disŝpruci* (la Ilustrita Vortaro diras DIS-PRUCI, sed tio sendube estas preseraro) la klarigo estas, ke la vorto estas *netransitiva*, kun la signifo *rapide, salte kaj fortege elflui, montriĝi dise*. (La difino estas preskaŭ tute kopiita el la Plena Vortaro, kiu diras *rapide, salte kaj fortege elflui eksteren*, dum la *Vortaro de Esperanto* de Kabe diras *vivege eliĝi en fluo aŭ en gutoj*.) La unua ekzemplo tamen uzas la *netransitivan* vorton en *transitiva* senco: *La fontano disŝprucis sian akvon ĉirkaŭe*. En Zamenhofa Esperanto oni dirus *disŝprucigas*.

Inter la strangaj vortoj kaj vortkunmetoj, kiujn S-ro Azorin uzas, unu estas *elkovri*: *Ameriko ne elkovriĝas dufoje* (Antaŭparolo); *Oni alnomas la kometojn per la nomoj de la elkovrintoj* (564). *Akuta* estas uzata en senco, kiun ĝi neniam havis ĝis nun: *akutigu la kraĵonon* (33). Ankaŭ kelkaj hispanismoj enŝteligis en la libron: *mostra* (anst. *montra*) *skatolo* (564), *anfiteatro* (anst. *amfiteatro*, 565), *Enriko* (anst. *Henriko*), *prepozición* (kun akcento) sur paĝo XIV. Parto el la gramatikaj eraroj (nominativo kun infinitivo, participoj ne rilatantaj al la subjekto de la frazo, ktp.) sendube ankaŭ estas kaŭzita per imitado de la hispana uzo.

Pri neologismoj S-ro Azorin havas specialan teorion. En "Aŭtokritiko", kiun li bonvolis sendi al mi, li klarigas, ke li "celis respekti la admireblan simplecon de nia lingvo, ne pligrandigante vane ĝian radikaron". Li do ne enmetis "la kapricajn anstataŭaĵojn de la mal-vortoj", kiujn oni trovas en la *Suplemento* al la Plena Vortaro (mi tamen notis la neologismon *aperiti* anstataŭ *malfermi*). Sed li faras ion alian. Li klopodas "plibonigi" Esperanton per "formetado de...radikvortoj senutilaj, vanaj, falsaj." Por li *kometo* estas *eta komo*, *koketa* venas de *koko*, *spirito* de *spiri*, *diplomato* de *diplomo*, *kolporti* de *kolo* kaj *porti*, *kanono* estas *ono de kano*, *dueto* estas *eta duo*, kaj *korveto* venas de *korvo*. En kelkaj kazoj S-ro Azorin faras tion sur la bazo de aŭtentika etimologia parenceco, en aliaj kazoj la rilato estas tute fantazia. Pri *korveto*, ekzemple, S-ro Azorin diras, ke ĝi estas *antikva trimasta militŝipo, ordinare nigre pentrita, kiel korvoj, pro tio la nomo*. Li eraras. *Korveto* estas ŝipo kun *korbsimila* formo.

Klopodante malpligrandigi la nombron de radikoj en Esperanto, S-ro

Azorin proponas ŝanĝojn en multaj vortoj. *Kavalerio*, kiu ja rilatas al *ĉevaloj*, ĉu ne?, fariĝas *ĉevalirio* (*ĉeval-ir-i-o*), *graveda* fariĝas *grav-id-a*, pro la vorto *kleptomano* S-ro Azorin inventas verbon *klepti*, *absolvi* fariĝas *al-solv-i* (*ni absolvas vin kaj estu absolvita* estas ekzemploj donitaj sur paĝo 39), *amortizi* fariĝas *al-mort-ig-i*, kaj tiel plu. Ŝajne S-ro Azorin tute ne komprenas la principon de vortfarado en Esperanto (kaj neniu el liaj "kompetentaj" kunlaborantoj klarigis ĝin al li). En nia lingvo ĉiu vortelemanto havas *precizan* signifon, kaj vortkunmetoj estas tute logikaj (en la granda plimulto) aŭ almenaŭ duonlogikaj kun forta analogio al naciaj lingvoj. Vortoj kiel *pendigi*, *dancistino*, *bluokula*, *grandegulo*, *ĝardenpordo*, *malsupreniri* estas aŭtomate kompreneblaj al ĉiu, kiu lernis la vortelemantojn. Vortoj kiel *interrompi*, *reprezenti*, *malvarmumi*, *subaĉeti* estas aŭtomate kompreneblaj nur al personoj, kiuj havas similajn vortkombinojn en sia propra lingvo. Aliaj devas lerni la signifon de la vortkunmetoj, kvankam kompreneble la scio de la vortelemantoj (kaj la preskaŭlogika derivado) faciligas la lernadon. La etimologiaj derivaĵoj de S-ro Azorin tamen estas tute alia afero. Neniu, kiu scias la vorton *korvo* kaj la sufikson *-et-*, aŭtomate komprenos la signifon *korveto*.

Cetere S-ro Azorin ofte tre komplikigas etimologiajn klarigojn. Pri *cifonismo* li skribas, ke ĝi estas "puno uzita de antikvuloj, konsistanta ligi kondamniton, nudan kaj mielsmiritan, por ke la cifonoj (insektoj) igu lin suferi per pikado." Mi scivolos, kie la aŭtoro trovis tiun groteskan klarigon. *Cifonismo* simple venas de la greka vorto *kyphon* ("jugo") kaj estis formo de piloriado en jugforma pilorio.

La Ilustrita Vortaro ankaŭ donas fuŝajn klarigojn pri gramatiko kaj vortelemantoj. Al *estanta*, *estinta* kaj *estonta* S-ro Azorin aldonas *est-unta*. Pri *al* li diras, ke ĝi estas "afikso uzebla prefikse kaj sufikse"; unu el la konsekvencoj estas, ke la vorto *idealo* tute mankas en la Ilustrita Vortaro, sed ke la adjektivo *ideala* enestas kiel derivaĵo de *ideo* (*ide-al-a*, al *ideo* rilata). Alia dubvalora klarigo estas "Noto" sur paĝo 262 kun subskribo D.R.B. (sendube Donald R. Broadribb): "La signifo de *-ec-* estas 'universala, abstrakta', dua en la skalo -o; la -o montras plej abstraktan ideon; tiel, la bonon oni ne povas trovi; la bonecon, jes, en io, en iu; la bonaĵo jam tute konkretiĝas." Tio ne estas ĝusta. "La bono" ne ĉiam estas la abstrakta ideo de la radiko *bon-*; *bono* ankaŭ povas esti uzata en la sencoj de *boneco* kaj *bonaĵo* kaj eĉ en la sencoj de *bonfarto*, *bonhavo*, *pliboniĝo*. En la Proverbaro de Zamenhof ni trovas la ekzemplon: "Bono posedata ne estas ŝatata."

Estas multaj aliaj strangaĵoj en la Ilustrita Vortaro. Anstataŭ *tiu ĉi*, *ĉi tiu* aŭ *ĉi-tiu*, S-ro Azorin ĉiam skribas *ĉitiu*. Li uzas *plej* kun substantivoj (*la moderna plej gravulo*, 452). Li skribas *Asio* anstataŭ *Azio*, *filozofo* anstataŭ *filozofo*, *aŭtomovilo* anstataŭ *aŭtomobilo*. Fakte li klopodas instrui novan dialekton de Esperanto, dialekton, kiun neniu parolas kaj sendube neniu parolos.

Mi jam diris antaŭe, ke la verko ankaŭ enhavas multe da bona kaj valora materialo kaj ke ĝi sendube instigos pluan studadon. Sed la trezoroj estas tiel miksitaj kun fuŝaĵoj kaj konfuzaj klarigoj, ke estas malfacile ellavi la oron el la sablo. Pri la fuŝaĵoj mem oni povas citi trafan juĝon de S-ro Azorin en la Antaŭparolo: "Sed la popolo, kiu fakte uzas tiun lingvon kaj trovas ĝin taŭga, rifuzas akcepti tiajn arbitraĵojn."

LA AMINDUMO DE HIAVATO

"Hiawatha's Wooing" de Henry W. Longfellow

Inter la paperoj de nia mortinta samideano *Ernest G. Dodge* ni trovis ĉi tiun tradukon de parto de la amata poemo "Kanto pri Hiavato". Tamen ni ne scias kies traduko ĝi estas. (S-ro Dodge mem ankaŭ tradukis ĝin, sed iom alie.) Ĝi estis presita verŝajne en iu malnova libro. Sed, ĉar ĝi estas unike bela traduko, ni kun plezuro represas ĝin sube. Se iu scias de kiu fonto ĝi venis kaj de kiu tradukita, ni tre dankos por tiu informo.

Pri la poemo mem, kiel ni diris, ĉi tiu peco estas ĉerpita el la pli longa poemo "Kanto pri Hiavato", verkita de unu el la plej famaj poetoj de Usono, *Henry W. Longfellow* (1807-1882). En tiu verko la poeto kunmetis diversajn tradiciojn kaj legendojn de la nord-amerikaj indianoj, kaj teksis ilin en unu belan poemon pri la vivo kaj faroj de Hiavato, supozita ĉefo de la konata gento Oĝibvoj (Ojibway), kies loĝloko estas la meza parto de Usono kaj Kanado proksime al la granda Lago Superior.

La ritmo de la poemo estas fidele prezentita per ĉi tiu traduko. En la angla, kiel ĉi tie, la versoj donas apartan impreson de ĉarma fantazio, miksitaj kun multe da saĝa rezonado kaj filozofio. La efekto de original-eco, kiu karakterizas la verkon estas pliigita per diversaj ecoj propraj al la poemo, inter ili la oftaj citoj de indianaj vortoj.

"Kiel al pafark' la ŝnuro,
Tiel la virin' al viro;
Lin fleksante, ŝi obeas,
Lin tirante, tamen sekvas,
Senutila ĉiu sola!"

Tiel pensis la junulo
Hiavato, kaj meditis,
Diverssente perpleksita,
Senatenta, sopiranta,
Kun timemo, esperemo,
En revad' pri Minehaha,
Bela la Ridanta Akvo,
En la lando de l' Dakotoj.
"Vi edziĝu" — lin avertis
La maljuna Nokomiso —
"Kun samgenta virgulino:
Ne foriru orienten,
Ne foriru okcidenten,
Elserĉante fremdulinon
Ne al nia gent' konatan;
Kiel fajr' sur kamenŝtono
Estas simpla virgulino,
La filino de najbaro;
Nur stellumo aŭ lunlumo
La plej bela fremdulino!"

Tiel lin ŝi malkonsilis,
Kaj respondis Hiavato



Nur la jenon: "Nokomiso,
Mia karulin' maljuna,
Plaĉa estas fajrolumo,
Sed pli multe al mi plaĉas
La stellumo, la lunlumo!"

Tiam diris Nokomiso
La maljuna, gravmiene,
"Ne ĉi tien alkonduku
Malageman virgulinon,
Senutilan, man-mallertan,
Kun piedoj malvolontaj;
Sed edzinon fingro-viglan
Kun kunmovaj man' kaj koro
Kun piedoj volontemaj!"

Ridetante li respondis:
"En la lando de l' Dakotoj
Loĝas ĉe la Sagfaristo
La filino, Minehaha,
Loĝas la Ridanta Akvo,
La plej bela el virinoj.
Ŝin al via la vigvamo
Mi kondukos, kaj plenumos
Ŝi la viajn komisionojn,
Estos ŝi al vi stellumo,
Lunolumo, fajrolumo,
La sunlumo de l' popolo!"

Malkonsilis Nokomiso:


"Ne al mia la loĝejo
 Vi konduku fremdulinon
 El la lando de l' Dakotoj!
 Kruelegaj estas ili,
 Ofta inter ni milito,
 Malpacad' neforgesebla,
 Vundoj kiuj doloradas,
 Kiuj povas resangadi!"

Li respondis ekridante:
 "Tio estas mem kialo
 Ke mi nun edziĝi volas
 Kun la bela Dakotino:
 Ke paciĝu niaj genoj,
 Forgesigu la malamo,
 Kaj la vundoj elsanigu!"

Tiel Hiavato iris
 Al la lando de l' Dakotoj,
 Lando de virinoj belaj;
 Trans herbejoj paŝegante,
 Tra senfinaj arbaregoj,
 Tra silento nerompita.
 Per magiaj mokasenoj
 Ĉiupaŝe li mezuris
 Mejlon, tamen lia vojo
 Ŝajnis longa, kaj la koro
 Preterkuris liajn paŝojn.
 Senripoze li vojaĝis,
 Ĝis li aŭdis la tondradon
 De la granda Akvofalo
 Minehaha, lin vokanta
 Tra l' silento de l' arbaro.
 "Plaĉa sono", li murmuris,
 "Plaĉa voĉo min vokanta!"

Ĉe l' ekstero de l' arbaro,
 Inter ombro kaj sunbrilo,
 Jen cervaro sin paŝtadis,
 Sed ne vidis Hiavaton.
 Al pafarko li murmuris,
 "Ho pafarko, vi ne manku";
 Al la sago, "ne malcelu";
 Al la ruĝa kor' de cervo
 Sendis li siblantajn sagon;
 Ĵetis cervon sur la ŝultron,
 Tuj antaŭen rapidegis.

Apud la vigvamo sidis
 Maljunega Sagfaristo,
 En la lando de l' Dakotoj,
 Pintojn por la sagoj faris
 El kalcedoni' kaj jaspoo.



Apud li sidanta estis
 La belega Minehaha,
 La filin', Ridanta Akvo,
 Junkajn matojn kunplektante;
 Liaj pensoj pri pasinto,
 Ŝiaj pri estonto estis.

Li pensadis pri la tagoj
 Kiam li per sagoj tiaj
 Cervon kaj bizonon frapis
 Sur herbejo, Muskodajo,
 Kiam li anseron pafis
 La sovaĝan, sudflugantan,
 La Vavaon bruegantan;
 Pensis li pri militistoj,
 Kiuj ofte en aregoj
 Venis por aĉeti sagojn,
 Liajn necesegajn sagojn.
 Ha! ne plu bravuloj tiaj
 Estas sur la ter' troveblaj;
 Nun la viroj ĉiuj estas
 Kiel la virinoj; uzas
 Nur la langojn por armiloj!

Ŝi pensadis pri ĉasisto
 Aligenta, alilanda,
 Juna, granda kaj belega,
 Kiu venis unu tagon
 Je mateno de printempo,
 Venis por aĉeti sagojn;
 Ripozadis ĉe l' vigvamo,
 Ĉe la pordo longe restis,
 Forirante re-rigardis.
 Ofte ŝia patro laŭdis
 Sagon lian kaj kuraĝon.
 Ĉu li venos sag-serĉante
 Ree al la Akvofalo?
 Sur la mato ŝiaj manoj
 Kuŝis nun mallaboremaj;
 Kaj okuloj ŝiaj revis.

Tra pensado ili aŭdis
 Piedsonon; tra la branĉoj
 Aŭdis ili susuradon,
 Kaj kun ruĝa frunt' kaj vango,
 Kun la cervo sur la ŝuldroj,
 Jen subite el arbaro
 Tie staris Hiavato.

Tuj la Sagfarist' maljuna
 De la sagfarado levis
 La okulojn, gravmiene,
 Flanken metis la laboron,


Petis lin eniri domon,
Diris, dum li malsidigis,
"Hiavato, vi bonvenu!"

Ĉe piedoj de l' knabino,
De Ridanta Akvo, metis
Hiavato sian ŝarĝon,
Ĵetis cervon de la ŝultroj.
La knabin' rigardis supren,
De la junka mat' rigardis,
Diris kun mieno dolĉa
"Vi bonvenu, Hiavato!"

Vasta estis la vigvamo,
El cerv-pelto blankigita,
Kun la Dioj de l' Dakotoj
Sur la kurtendar' pentritaj,
Kaj la pordo tiel alta
Ke apenaŭ Hiavato
Devis klini sian kapon
Enirante, kaj apenaŭ
Tuŝis ĝin la agloplumoj.

Tiamla Ridanta Akvo
Minehaha, ekleviĝis;
Kaj la maton nefinitan
Demetinte, ŝi al ili
Antaŭmetis manĝon, akvon
El la rivereto portis,
Donis manĝon en terpotoj,
Trinkon en tiliaj kuvoj,
Kaj silente ŝi aŭskultis
Dum la gasto paroladis,
Dum la patro respondadis,
Nek malfermis ŝi la lipojn,
Nek eligis unu vorton.

Kvazaŭ sonĝe ŝi aŭskultis
Hiavatan la parolon
Pri maljuna Nokomiso,
Kiu zorgis lin infanon,
Ankaŭ pri kunuloj liaj,
Ĉibiab', la muzikisto,
Kaj la fortegul' Kvasindo,
Pri feliĉo kaj prospero
En la lando de l' Oĝibvoj,
Land' agrabla kaj pacema.
"Post longtempo de milito,
De sangplena disputado,
Paco inter la Oĝibvoj
Kaj la gent' Dakota estas."
Tiel diris Hiavato,
Kaj aldonis, malrapide:



"Por ke paco ĉiam daŭru
Kaj la manoj kunpreniĝu,
Kaj la koroj kunigadu,
Al mi donu por edzino
La knabinon Minehaha,
Donu la Ridantan Akvon,
La plej belan Dakotinson!"

Kaj la Sagfarist' maljuna
Iom restis senresponde,
Iom fumis en silento,
Hiavaton alrigardis
Kun fiero kaj rigardis
Ame al Ridanta Akvo,
Kaj respondis, gravmiene:
"Jes, se Minehaha volas;
Ekarolu ŝia koro!"

Kaj Ridanta Akvo bela
Eĉ pli bela ekaspektis
Dum ŝi staris, nek volonte
Nek kontraŭe malvolonte;
Iris ŝi al Hiavato,
Dolĉe apud li sidigis,
Dum ŝi diris, ruĝigante,
"Mi vin sekvos, mia edzo!"

Tiel la amindumado,
Tiel Hiavato gajnis
De la Sagfarist' filinon,
En la land' de la Dakotoj!
El vigvamo li eliris,
Kaj kun li Ridanta Akvo;
Ili man' en man' kuniris
Tra arbaro, trans herbejo,
Lasis maljunulon sola
Ĉe la pordo de l' vigvamo;
Aŭdis ili Akvofalon
Tra l' distanco alvokanta,
El la malproksim' diranta,
"Adiaŭon, Minehaha!"

Kaj la Sagfarist' maljuna
Sin returnis al laboro,
Ĉe la suna pord' sidigis,
Kaj al si murmuris dolĉe:
"Tiel lasas nin filinoj,
La amataj, la amantaj;
Ĝuste kiam ili lernis
Maljunulojn nin helpadi,
Nin de ili dependantajn,
Jen junulo fremda venas,
Kun paradaj plumoj vagas

Tra l' vilaĝo ŝamludante,
Manosignas al knabino
La plej bela, kaj volonte
Ŝi lin sekvas laŭkonduke,
Ĉion lasas pro fremdulo!"

Plaĉa la vojaĝo hejmen,
Tra senfinaj arbaregoj,
Tra herbejoj kaj montetoj,
Tra riveroj kaj valetoj.

Ŝajne tre mallonga estis
La vojaĝ' por Hiavato,
Kvankam ili malrapidis,
Kvankam sian rapidecon
Li prizorgis, malakcelis,
Taŭge por Ridanta Akvo.

Super larĝaj riveregoj
Portis li la virgulinon
En la brakoj; ŝin li trovis
Malpezega kiel plumo,
Kiel plum' en sia ĉapo;
Antaŭ ŝi li faciligis
Vojon plenan de obstrukcoj,
Deturnadis svingajn branĉojn;
Nokte faris li el branĉoj
Loĝejeton, per branĉetoj
De la cugo faris liton,
Kaj bruligis ĉe la pordo
Fajron el pinfruktoj sekaj.

Ĉiuj ventoj kunvojaĝis
Trans herbejon, tra arbaro;
Ĉiuj steloj de la nokto
La dormantojn observadis
Per okuloj nedormantaj;
El kaŝejo en la kverko
Ekrigardis Aĝidaŭmo,
La sciuro, observadis
Kun vigleco la amantojn,
Antaŭ ili la kuniklo,
La Vabaso, forkuregis,
Ekrigardis el la kavo,
Rekte sidis sur la koksoj,
Kun okuloj scivolemaj
Observadis la amantojn.

Plaĉa la vojaĝo hejmen:
Ĉiu birdo kantis laŭte
Dolĉajn kantojn pri feliĉo,
Pri trankvilo en la koro;
Kantis la blu-bird', Ovajso,
"Vere estas vi feliĉa,




Hiavato, kun edzino
Tiel kara kaj amema!"
Kantis ankaŭ Opeĉio,
La ruĝgorĝo, "Ho, feliĉa"
Estas vi, Ridanta Akvo,
Havi tiel noblan edzon!"

El ĉiel' la sun' bonkora
Tra la branĉoj alrigardis,
Kun la diro, "Ho infanoj,
Amo estas sunbrilego,
Sed malamo estas ombro;
Vivo estas diverseca,
Ombro kaj sunbrilo; regu
Per la amo, Hiavato!"

El ĉiel' rigardis luno,
Kaj plenigis la loĝejon
Per mistera belegeco,
Murmurante, "Ho infanoj,
Sentrankvila estas tago,
Sed kvieta estas nokto;
Ordonema estas viro,
Kaj virino malforteĝa;
Sekvas mi, sed mia estas
La duon'; per pacienco
Regu, ho Ridanta Akvo!"

Tiel ili hejmeniris;
Tiamaniere venis
Kondukite al la domo
De maljuna Nokomiso
La lunlumo, la stellumo,
La fajrlumo, la sunlumo
De l' popol', Ridanta Akvo,
La plej bela el virinoj
En la lando de l' Dakotoj,
En la land' de belulinoj.





DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Aŭstralio.** Walter Goerisch, J 435, *Yallourn-East*, Victoria. 32-jara germana enmigrinto en Aŭstralio dez. kor. Esperante, angle aŭ germane kun Usona aŭ Kanada fraŭlino.
- Ĉeĥoslovakujo.** Johano Kuthan, Sušice 1, *p. Postupice u Benešova*. 26-j. dez. kor. kun gestudentoj, interŝ. il. PK, gazetojn.
- Danujo.** P. Zacho, Randbólvey 4, *Copenhagen*. 10 gekomencantoj 20 ĝis 50 jaraj deziras korespondi.
- Francaujo.** Gerard Mothu, 7 rue Maréchal Foch, *Clery* (Loiret). Serĉas korespondantojn por 40 gejunuloj.
- Francaujo.** Serge Tisseraud, Rue des Moines, *S. Pnyvé-S. Mesmin* (Loiret). 20-jara, elektristo, deziras korespondi.
- Hispanujo.** Enrique Llonch, Plaza S. Francisco 25 (S. A.), *Barcelona*. Deziras korespondi kaj interŝanĝi PK kaj PM.
- Italujo.** Vittorio Canavero, Via Nizza 48, *Torino*. Deziras korespondi kun fraŭlino en Usono.
- Japanujo.** Nobuaki Yanagisawa, Hisagi Yanaharacho, *Kumegun Okayama*. 23-j. oficisto dez. kor., interŝ. PM, il. PK, kino-gazetojn.
- Japanujo.** F-ino Masako Yanagisawa, Hisagi Yanaharacho, *Kumegun Okayama*. Deziras korespondi.
- Japanujo.** Kinomoto Esperanto-Societo, Kinomoto Alt-Lernejo, *Kumano-si, Mie-ken*. 15-17-jaraj gelnantoj deziras korespondi.
- Kolombio.** Tirso Castrillon Velez, Carrera 35, No. 48a-52, *Medellin*. Deziras korespondi kun Nord-Amerikanoj.
- Kolombio.** Pedro Arturo Agudelo G., Carrera 35, No. 49-43, *Medellin*. Deziras korespondi kun Nord-Amerikanoj.
- Usono.** Nova Esperanto-Klubo estas formata en Houston. Lernejo Esperanton senpage, kaj helpu al la Esperanto-movado. Telefonu: MI 9-8247. Skribu: Edward F. Lacy III, P. O. Box 805, *Houston, Texas*.

I. V. E. - ORMINEJO POR LA SPERTA ESPERANTISTO

La "Ilustrita Vortaro de Esperanto" (unua volumo A-K) havas 660 grandformatajn paĝojn; pli ol 600 bildojn; tabelojn pri gramatiko, aritmetiko, arkitekturo, geologio, kemio, zoologio, ktp. Ĝi havas pli ol 50,000 vortojn, kun multaj ekzemploj kaj modelaj frazoj grandparte el la verkoj de Zamenhof. Ni ĉerpas el recenzo de D-ro Solzbacher pri I. V. E.: "La verko enhavas multe da valoro kaj pensiga materialo, kaj ĝi estas utila al spertaj kaj kritikaj uzantoj." Mendu vian ekzempleron de I. V. E. nun ĉe la EANA Libro-Servo. Senrabataj prezoj, afrankite, *bindita* \$7.00, *broŝurita* \$6.50. Ni liveros ĝin tuj al vi. Sendu vian mendon al:

ESPERANTO, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

THE CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus personal instruction. You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. Compiled by experts.

The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight "*Vinylite*" double-sided 10 records, 78 r.p.m.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of Mrs. Connor.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete *Study Guide* for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order **NOW**:

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

TRE BEDAŬRINDA PRES-ERARO PRI FOTO DE LOLA MAE MUSE - PAĜO 14

Malĝojiga estas pres-eraro, fare de nia presejo pri la foto de nia mortinta amikino Lola Mae Muse, sur paĝo 14 de "AE" por Jan-Feb 1956. Por havi bonan foton de ŝi, ni elektis tiun komplikan foton, kiu montriĝas nun, sed ni zorgeme kaj klare markis, ke nur la individua parto, nome la dua bildo de dekstre estu presita sole kaj grande. Ne nur ni, sed la respondeca presisto, profesie markis la foton por korekta preso. Tamen, ni lernis tro malfrue, ke estas nova artisto en la art-departemento, kiu ignoris la klarajn instrukciojn. Ni ne tranĉis la grandan foton, ĉar la edzo de Lola Mae deziras teni ĝin - kaj presejoj tre ofte aranĝas preson de iu ajn parto de iu ajn foto. Tre malĝojiga estas, ke tiu ŝerc-foto en kiu ŝi aperas en kvin pozoj, estis presita. Bedaŭrinde oni presis la tutan bildon anstataŭ nian elekton de nur unu pozo. Ni petas la komprenon de ŝiaj parencoj kaj de niaj legantoj pri la vere bedaŭrinda eraro, farita de nia presejo. -- La Redaktoro.